

Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Cours d'espéranto, conférences, expositions...

17, rue Pierre Clostermann 24330 BASSILLAC Tél. : 05 53 54 49 71

<http://esperanto-gep.asso.fr>

esperantoperigord@yahoo.fr

Présidents d'honneur : Jacques GREGOIRE et Jacques RAVARY.

Président : Ange MATEO, 24330 Bassillac

06 88 74 94 78 angemateo@yahoo.fr

Vice-président : Maurice JUY, Les Campagnolles, 24370 Calviac en Périgord.

05 53 59 60 27 monique.juy@wanadoo.fr

Vice-président : Claude LABETAA, 17, rue Pierre Clostermann, 24330 Bassillac.

05 53 54 49 71 labetaa.claude@wanadoo.fr

Secrétaire : Martine DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 martine.demouy@wanadoo.fr

Secrétaire adjointe : Michèle DELPEY, 31, rue Antoine Gadaud, 24000 Périgueux.

05 53 09 30 88 lmdepey@gmail.com

Trésorier : Max DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 max.demouy@wanadoo.fr

Trésorière adjointe : Anne-Marie GALESNE, 96, rue Gambetta, 24000 Périgueux

06 47 33 96 07 anne-marie.galesne@orange.fr

Autres membres du CA : Alexia AUGRAS (déléguee auprès des jeunes), Odette Jardin et Sylvie Jouget.

Relais locaux (des espérantistes près de chez vous) :

Bergeracois : Alain et Brigitte BROQUET, le Canton, 24520 Saint-Sauveur de Bergerac.
06 51 24 50 24 ab.24@free.fr

Mussidanais : Richard RIO, 25 rue Arzens, 24400 Mussidan.
05 53 82 69 71 r.rio@laposte.net

Périgueux et agglomération : Claude LABETAA (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Saint Cyprien : Odette JARDIN, lieu-dit Escavailles, 24220 SAINT CYPRIEN
05 53 29 32 75 odet.jardin@orange.fr

Sarladais : Maurice JUY (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Informilo / Bulletin d'information

Rédaction collégiale. Mise en page Claude Labetaa. Envoyez vos documents, si possible en format numérique à labetaa.claude@wanadoo.fr, avant le :

1^{er} février pour le n° du printemps 1^{er} mai pour le n° de l'été

1^{er} août pour le n° de l'automne 1^{er} novembre pour le n° de l'hiver.

Cotisations 2018 (de sept 2017 à août 2018)

Sauf erreur de notre part, vous êtes dans la situation suivante : ☐ service gratuit

☐ adh 2017 ☐ sout 2017 ☐ adh 2018 ☐ sout 2018 ☐ veuillez régler :

Attention ! Nous proposons maintenant une adhésion commune Espéranto-France - Groupe Espérantiste Périgourdin ouvrant droit à déduction fiscale. Bulletin et précisions sur demande aux adresses ci-dessus ou auprès de nos animateurs.



ESPERANTO

Périgord

INFORMILO n-ro 111

Printempo 2018

Le bulletin d'information du Groupe Espérantiste Périgourdin,
trimestriel en français et en espéranto.



L'auteur espérantiste bulgare Georgi Mihalkov, alias Julian Modest, nous a rendu visite en Périgord. Le voici à Lascaux IV (page 4)

- Prezento de nova muzeo en la Nigra Perigordo page 5
- Skype en espéranto entre jeunes français et polonais page 5
- « Le cri du silence » : nouvelle de Patrick Salinié, sur le thème des migrants en Méditerranée, traduite en espéranto page 6

kaj tiel plu...

par Ange Mateo

L'espéranto a également subi le rejet, l'opprobre et l'interdiction. En France, en 1922, le ministre de l'instruction publique, M. Léon Bérard interdit par circulaire l'enseignement ou la promotion de l'espéranto dans les établissements publics. Hitler et Staline la rejeteront également, le premier l'englobant dans une vaste conspiration juive, le deuxième la taxant de cosmopolitisme bourgeois. Et pourtant l'espéranto est encore là, traçant son chemin dans le sillon de l'histoire, elle réunit à travers la planète les humains de bonne volonté qui pensent que le dialogue et le partage dans le respect des différences sont plus que jamais des valeurs à promouvoir en ce début de XXIème siècle.

Correction de la grille du numéro précédent

Quelques commentaires :

1	J	2	A	3	R	4	O	5	A	6	C	7	A	8	J
			B			9	S	10	P	L	I	G			
11	J	12	N			13	N	E				14	A		
15	E	L	E	16	F	A	N	T	17		18	D		C	
19	S	U	B	A				20	T	E	D	I			
		21	J	U	R								22	A	
23	P	O	L	I	C	I	S	T	O	N					
	A			28	O	T	A			29	A	R	M	I	
30	N	31	U		32	A	R			33	K	I	A	M	
34	O	K			35	J	O	G	O			36	G		

supla = souple

supligi = rendre souple, assouplir

juro = le droit (*juristo* = un juriste), à ne pas confondre avec :

ĵuro = un serment (*ĵuri* = jurer, prêter serment)

pentri = peindre (un tableau), à distinguer de :
farbi = peindre (un mur par exemple)

Après élision du *o* final, *ado* devient *ad'*, *juro* devient *jur'*, *aro* (groupe) devient *ar'*.

BALDAŨ... BIENTÔT...

Le congrès universel de Lisbonne

Il aura lieu du 28 juillet au 4 août. Plus de 1500 espérantistes de 75 pays y participeront.

20 Périgourdins, dont 3 enfants, sont inscrits.

Reprise des cours à Trélissac

Ce sera le vendredi 14 septembre, comme d'hab' au foyer socioculturel.

Kvinpetalo (4 rue du Bureau, 86410 Bouresse)

Pas de stage annoncé cet été à l'heure où nous bouclons l'informilo.

Renseignements et inscriptions : <http://kvinpetalo.org>

Le château de Grésillon (Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé)

Du 9 au 27 juillet est organisé un « cours marathon d'espéranto ». On peut participer partiellement ou en totalité (stages de 7, 12 ou 18 jours). En parallèle :

9 au 16 juillet 2018 : échanges de savoirs, dans l'esprit SEL, RERS et JEU.

16 au 22 juillet 2018 : visites guidées en Anjou.


21 au 27 juillet : « L'espéranto dans les arts ». Une semaine de conférences.

11 au 19 août : 8^{ème} semaine festive pour enfants, familles... Cours et activités diverses.

Renseignements et inscriptions : <http://www.gresillon.org>

KRUCVORTENIGMO

far Claude Labetaa



La grille ci-contre s'adresse plutôt aux espérantistes confirmés. Les débutants pourront cependant s'y attaquer à partir de notre site web, où l'aide en ligne pourra leur être utile. Adresse : <http://esperanto-gep.asso.fr> Voir à la page "jeux" la grille "kve 08".

Horizontale:

1. Prepozicio montranta iron eksteren.
3. Ili ŝirmas la piedojn.
8. Erari en konto.
11. Fino de partícipio.
12. Mallaŭda sufiks'.
13. Inklini al kontraŭstaro, severeco.
16. Element'.
17. Radiko por uzo sen aĉeto.
18. Sinjorino de nelonge.
21. Por diri la malon de jes.
23. Vin kaj min.
25. Moviĝo de akvo.
27. Altirata.
29. En iu maniero.
30. La duono de kvarono.
31. Senakva.

Rappel : une apostrophe dans la définition indique l'élision du « o » final d'un substantif. Il faut donc chercher une racine.

Vertikale:

1. Grava persono.
2. Ero de vorto.
3. Li ofte tenas enmane turon aŭ ĉevalon.
4. Person'.
5. La duoblo de kvar.
6. Ĝi kelkfoje antaŭas "pli".
7. Sen monmanko.
9. Unu el la tutmondaj esperantistaj asocioj.
10. Lumigilo.
14. Grasa likvaĵ'.
15. Restaĵo de konstruaĵo.
19. Flanko de vizaĝo.
20. En neniu loko.
22. Kies formo estas facile ŝanĝebla.
24. Tabelvorto en akuzativa formo.
26. Sep plus tri.
28. La kvaroblo de du.

INFORMOJ

Disparitions

Gabrielle Dumon nous a quittés à l'âge de 95 ans. Elle fut longtemps « gvidantino » d'un cours à Boulazac, puis à Trélissac, alors que Jean, son époux, était « kasisto » du GEP. Elle était également l'auteure d'un livret de recettes culinaires périgourdines en espéranto, ainsi que de plusieurs ouvrages en français.

Régine Dailly, décédée à 87 ans, était une élève assidue de Gabrielle, malgré ses obligations professionnelles d'infirmière.

Toutes deux faisaient partie des « pionnières » du Groupe Espérantiste Périgourdin...

Un couple d'espérantistes irlandais à Périgueux

En avril, Christine et John Murray, deux espérantistes irlandais, ont rendu visite à Martine et Max. La photo ci-dessous a été prise par Martine lors d'un sympathique repas en leur compagnie, place du Marché au Bois (Périgueux).




Christine est à droite, entre Anne-Marie et Claude ; John est à gauche, entre Paulette (de dos) et Alain.



GEORGI MIHALKOV, alias JULIAN MODEST

Georgi Mihalkov, plus connu sous son nom d'auteur Julian Modest, nous a rendu visite en Périgord. Après avoir visité Lascaux en compagnie de Martine et Claude, il a participé à notre assemblée générale et, l'après-midi, y a animé une conférence sur son pays, la Bulgarie.

On le voit ci-dessous animer la conférence, lire un poème bulgare traduit ensuite par Martine et Claude, recevoir des mains d'Ange les deux principaux ouvrages traduits par notre association, prendre un pot aux Eyzies...



planedoj formiĝis, kuniĝis kaj disiĝis.

Li havis la senton, ke li ĉeestas monstran naskon. Infano eliris el la ventro de sia patrino. El la ventro de la maro. Ŝajnis al li, ke li estas tiu infano kaptita inter du akvoj. Li perceptis krion. Sed tiu krio havas la kruelegan econ esti silenta. Li ĝin vidis sed ne aŭdis!

Delteil eksalte vekiĝis kaj sidiĝis sur la lito, anhelanta kaj febranta. Li bezonis kelkajn sekundojn por reakiri la spiron. La bildo de la krio pludaŭris, krio el silento, kiu memorigis al li tiun enscenigitan de la pentristo Munch.

La morgaŭon en ĉiuj ĵurnaloj foto okupis la tutan frontpaĝon. Ĝi montris kvinjaran infanon mortintan sur strando de Grekio. Infanon senvivan, kun la vizaĝo en la sablo kaj la akvo. Infanon de migrantoj similan al niaj infanoj, kun lia T-ĉemizo, lia bluĝino kaj liaj etaj ruĝaj basketŝuoj.

Kiam la buso alvenis sur la placo de la vilaĝo la homamaso efektive ĉeestis. La du paroj kaj iliaj infanoj, ĝojradiantaj, elbusiĝis renkonte al ĝi. Ili baldaŭ estis kaptitaj de oceano da afablaĵoj. La urbestrinon surprizis la alveno de Delteil, portanta brakplenon da jonkviloj, kiun li donacis al la virinoj de la grupo.

- Mi ĝojas vidi vin inter ni! Kion ŝanĝis vian opinion?

- Tio surprizos vin, respondis Delteil, sed mi aŭdis krion... Eble tiun de mia konscienco.

Patrick Salinié a beaucoup de cordes à sa guitare : auteur, compositeur, interprète (groupe Peiraguda), maire de Saint-André d'Allas... Il nous a permis de traduire ce texte très émouvant, dont vous pourrez lire la version originale française sur notre site internet : <http://esperanto-gep.asso.fr>

Supo de ruĝaj (koralkoloraj) lentoj far Dominique Karaca laŭ turka recepto

Por kvar personoj necesas:

- Unu glaso da ruĝaj lentoj, unu cepo, du supkuleroj da bulguro aŭ faruno.
- Olivoleo, tomatokaĉo, salo, papriko, seka mento.

Etapoj:

- Blondigi la cepon en olivoleo.
- Aldoni la farunon (se vi elektis ĝin) kaj poste akvon kaj tomatokaĉon.
- Aldoni la lentojn kaj bulguron (laŭ via elekto).
- Kuiri proksimume 20 minutojn. La lentoj iom post iom ŝvelas. Eble necesos aldoni akvon. Miksi.
- Servi kaj proponi aparte paprikon, sekan menton kaj aliajn spicojn...

intelektuloj, esploristoj, ekonomiistoj, Neŝtataj Organizoj, Ruĝa Kruco, inkluzive de la Episkopoj de Francio kaj eĉ ĝis la Papo! Mi estas konvinkita, ke tiu akcepto estos valoriga ne nur por la protektotaj personoj sed ankaŭ por nia komunumo, por la membraro de nia lernejo, por la aktiveco de nia vilaĝo, por nia kolektiva honoro!

Delteil elvokis la malsekurecon, la kulturen diferencon, la lingvan baron:

- Tiuj kompatinduloj estos perditaj en niaj kamparoj!

- Eble malpli ol sub la bomboj! substrekis la panistino. Mi alvenis kun miaj portugalaj gepatroj komence de la sesdekaj jaroj. La valizon el kartono, mi konas! Ni estis bone akceptitaj. Ni nun estas asimilitaj.

- Jes, reparolis Delteil. Sed por vi ne estas same. Vi havis la saman kulturon kiel ni, vi estis kristanoj.

Indignigita brukriado venis el la ĉambrego. La prefekto rebatis:

- Ni ne konsideru la haŭtkoloron, la devenon aŭ la religion de la homoj, kiujn ni akceptas! Mi kredas diveni vian penson. Ĝi ne honorigas vin. Plie, kiu diras al vi, ke la migrantoj, kiujn vi ricevos ne estas ateistoj aŭ orientaj kristanoj? Sabaton, je la 11a, ili alvenos buse. Mi proponas, ke vi faru belan akcepton! Mi komprenas la hezitojn de ĉiu el vi sed opinias, ke gravas montri vian unuecon per la varmo de tiu akcepto.

La urbestro precizigis, ke la ceremonio okazos en la geedziĝa ĉambrego.

- Mi proponas, ke ĉiu el vi venu kun floro enmane. Dankon al tiuj, kiuj povos sin liberigi.

Delteil denove montriĝis obstina:

- Ĉiukaze ne kalkulu pri mi!

La vilaĝo disiĝis ĉe tiu interŝanĝo.

Surmare, la vojaĝo fariĝis tragedio. Youmna subite stariĝis kaj kriis:

- Mia infano! Mia infano! Haltigu la ŝipon! Mia filo ĵus enfalis la maron!

Nadim rapidegis por provi ekvidi sian filon meze de la ondoj sed la piloto ne reagis, la ŝipo daŭre antaŭeniris.

- Haltu, mi diras, haltu!

Li provis trairi vojon ĝis la stirilo sed manoj kaptis lin por malhelpi. Li subite komprenis, ke nenio povos malrapidigi la movon de la ŝipo. Li malespere provis salti enakven por savi sian filon. Brakoj tenis lin malibera. Youmna, tordita de doloro, plorsingultis.

- « Skut! » ekkriis la piloto, silentu! Nenion ni povas fari. Ni ne revenos malantaŭen!

Jean Marc Delteil malfacile endormiĝis. La debato lasis postrestaĵojn. Li nun sinkis en koŝmaron, el kiu li vane provis eskapi. Li sufokiĝis kaj mallaŭte ĝemis, turmentata de strangaj vidaĵoj. Rondaĵoj flavecaj kaj malvakoloraj moviĝis ĉirkaŭ li, kiel malbonaŭgura mondo naskiĝonta. Ene de liaj fermitaj palpebroj likvaj

PREZENTO DE NOVA MUZEO EN LA NIGRA PERIGORDO

far Mireille Rousselle

La Komunaro de la Lando de *Fénelon* decidis transformi malnovan stacidomon por doni al ĝi ne nur novan vivon, sed ankaŭ alian funkcion.

La malgranda stacidomo de *Carlux* de longe ne plu vidis pasi trajnojn ĉar la linio de *Sarlat* al *Souillac* ne plu estas uzata ekde 1992... La reloj estis malmuntitaj, kaj la fervojo estas anstataŭigita per « verda vojo », kiu estas trafikplena de biciklantoj kaj ĉiuspecaj promenantoj. Kelkaj stacidomoj, kiuj staris ĉe la fervojo estis venditaj kaj iĝis loĝdomoj... Sed la Komunaro de la Lando de *Fénelon* rezervis al tiu de *Carlux* privilegian sorton, ĉar tiu stacidomo dum la dudeka jarcento estis fotita de la fama fotografisto *Robert Doisneau*, kies belegajn nigra-blankajn kliŝojn ĉiuj konas! Fakte li ofte venis pasigi siajn feriojn en tiu parto de Perigordo kun sia familio kaj siaj geamikoj; tie ili interalie ŝatis kanoti sur la rivero Dordonjo. Kaj do okaze de tio li fotis la malgrandan stacidomon de *Carlux*, kiu tiel iĝis fama...

La konstruaĵo estas renovigita kaj pligrandigita; kaj de nun ĝi estas dediĉita al pluraj funkcioj: krom la ĝuste nomita « Muzeo *Doisneau* », kiu evidente prezentas rimarkindajn fotojn fare de *Robert Doisneau*, oni tie trovas turismoficejon, kaj kunvenejojn por formadoj aŭ kolokvoj, kaj krome ĉambron por portempaj ekspozicioj. Kaj ni povas rimarki ĝian plejtaŭgan situon: ĝi troviĝas apud la rivero Dordonjo superstarita de la proksima kaj majesta kastelo de *Fénelon*, kie naskiĝis je la deksepa jarcento la fama prelato kaj verkisto *François de Salignac de la Mothe-Fénelon*. Krome ĝi staras ĉe la vojo kuniganta *Sarlat* kaj *Souillac*, kiuj estas du rimarkindaj urboj: tiu vojo estas vera ligilo inter la Nigra Perigordo, bone konata pro siaj multoblaj naturaj kaj kulturaj grandvaloraĵoj, kaj la pli sovaĝa Loto, kiu estas samgrade inda je admirado...

Do ne forgesu viziti tiun muzeon, kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, tuj post kiam vi havos la okazon!

Skype en espéranto

Le 15 juin, la classe CM1-CM2 de Stella (Bassillac) a communiqué par Skype avec une classe polonaise.

Stanisław Staszewski, de la ville de Aleksandrów Łódzki, est à l'origine du projet. Il enseigne l'espéranto à son petit-fils Olivier, et a contacté fin mai Claude Labetaa.

Claude a ensuite préparé cette rencontre par deux séances de présentation de l'espéranto avec l'aide de deux enseignantes, Karima El Haffar et Sabine Turschwel. Nous les remercions chaleureusement pour leur accueil et leur soutien à cette expérience.



LA KRIO DE LA SILENTO

far Patrick Salinié

esperantigis Claude Labetaa (kun la konsento de la aŭtoro, kiun ni varme dankas)

La luno forestis. Ĝi portempe fuĝis la ĉielon, kiun neniuj stelo najluzis. Aro da diskretaj kaj mutaj ombroj antaŭeniris en tiu nigro elektita. Viroj, virinoj kaj multaj infanoj alkroĉitaj al la larĝaj vestoj de siaj patrinoj. La sablo malrapidigis ilian silentan paŝadon. Post la duno estos sekva duno kaj denove plia. Iu falis stumblante pro la valizo, kiu batis siajn kruojn de la komenco de la nokto, kaj subpremis plendon.

- « *Skut!* » Silentu! blovis brutala voĉo. Ni alvenas! Mi volas neniun bruon! Post tiu monteto estas la strando. Kaj la ŝipo. Supre de la duno la maron ili aŭdis sed ne vidis. Nur la ondosalto kaj resalto diris, ke ĝi estas tie. Eĉ la vento silentis, detenante sian blovon, kiel ili detenis sian.

Malantaŭ la ondoj ili finfine ekvidis malhelan mason, kiu dancis en la helaj ŝaŭmoj.

Unuvice, apogante sin unu sur la alia, ili eniris ĝis la talio en la malvarman akvon, kiu provis ilin malekvilibrigi, tenante super sia kapo siajn malmultajn pakaĵojn, kaj tiel brakforte ankaŭ la tro malaltajn infanojn.

De la fantomŝipo la trafikantoj levis ilin enŝipen unu post la alia, mallonge montrante la lokon por sidi, sin kaŝi, alpremiĝi kaj silenti.

Younna kaj Nadim kunigis siajn tri idojn kaj provis krei neston protektantan ilin kontraŭ la glueca feraĵo de la ŝelo. Nadim pensis pri ilia fuĝo el Alep. Li sin demandis, ĉu estis ĝuste, ke li kondukis sian familion en tiun rustan ŝipaĉon. Ili vojiris inter du danĝeroj, la milito persekutanta ilin kaj nekonata abismo, kiu malfermiĝis antaŭ ili. Timo, alia timo, kaj espero strange miksitaj. Kion ili trovos ĉe la alia flanko? Oni parolis al ili pri Ateno, pri la aŭtoritatoj. Nun la trafikantoj, incititaj, klarigas al unu el la fuĝantoj kiel piloti la ŝipon, kaj informas pri la farendaĵoj por atingi la grekajn marbordojn.

Ili donis al li simplan orientilon, ekfunkciigis likantan kaj aĉe bruon motoron kaj forlasis la ŝipon.

Je pli ol tri mil kilometroj de tie la vilaĝo sin pretigis travivi strangan sperton. La loĝantaro kunigis en la festoĉambrego por informiĝi pri la decidoj. La novaĵo partigis la loĝantojn. De ses monatoj preciziĝis la ideo akcepti migrantojn, subtenata de la loka asocio « Interhelpo ». Loĝejon oni antaŭvidis. Plejparto de la administratoj ne sin montris malfavoraj. Iuj proponis amasigi donacojn por digne akcepti siajn novajn kuncivitanojn. Sed laŭ aliaj postrestis dubo, proksima al kolero.

Sur flagrubando metita malantaŭ la podio la asocio « Interhelpo » proprigis al si laŭmodan kanzonon: « Mi deziras al vi ĉiujn feliĉojn el la mondo, kaj ke iu proponas sian manon! » anoncis sur ruĝa fono la afiŝo.

Antaŭ mova ĉeestantaro, konscia pri la oponoj, la prefekto prenis la mikrofonon:

- Gesinjoroj, via multnombra ĉeesto atestas, ke la propono, kiun mi venis esprimi ne lasas vin seninteresaj. Mi konfirmas al vi, ke post unu semajno du siriaj familioj estos akceptataj en via vilaĝo. Du paroj havantaj infanojn po du. Ili fuĝis teruraĵojn en sia lando enmilita. Ilia azilpeto estis akceptita kaj ĉio estis farita, por ke ilia enmiksado estu kvietaj. Mi deziras, ke ni havu pozitivan debaton, por alfronti ĉiujn restantajn demandojn.

La konversacio prezentis sin sub favoraj aŭspicioj. La prezidantino de « Interhelpo » rememorigis la devon pri homaranismo, menciis unu post la alia la kondiĉojn de akcepto, la monan subtenon de la ŝtato.

- Al homa aventuro ni ĉiuj estas invitataj. Mi certas, ke ĝi kondukos al reciproka riĉiĝo.

Kiuj estas kontraŭ la projekto, tiuj ankoraŭ ne diris eĉ unu vorton. Jean Marc Delteil, iu el la plej ardaĵoj kontraŭuloj, laŭvorte furiozis. Li tordiĝis sur sia seĝo blovante kiel foko. Li finfine decidiĝis ekataki.

La ŝipo batalis kontraŭ la ondoj. La sindeklarintaj maristoj kondukis la superŝarĝitan ŝipaĉon inter Ĥaribdo kaj Scilo, gvatante trans la muĝanta malhelo la trankviligan lumon de lumturo. 150 emociegitaj vizaĝoj streĉiĝis al ili. 150 vivoj pendantaj per unu sola fadeno observis iliajn hezitajn gestojn. La kaptitoj malsekegaj, maltrankvilaj, suferis la ondoŝprucaĵojn, turmentataj de neelteneblaj naŭzoj. La plej juna el la gefiloj de Youmna kaj Nadim, skuata de spasmoj, alkroĉiĝis al la ferdeka balustrado, vomante energion, kiu forlasis lin. Sur lia tiel pala vizaĝo, liaj okuloj iĝis grandegaj.

En la bolanta festoĉambrego Delteil stariĝis:

- Kial nia vilaĝo? Mi komprenas la suferon de tiuj migrantoj sed ni ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo! Niaj elektitoj ilin gastu en siaj hejmoj. Ni devas resendi ilin al ilia devena lando; se ne, pliaj venos, kiujn ni ne povos rifuzi. Ni ĉi tie havas sufiĉe da personoj travivantaj malfacilaĵojn aŭ senlaboraj, tial ni ne serĉu pliajn aliloke! Prioritaton al niaj samcivitanoj! Kelkaj sonaj aproboj sekvis tiun deklaron.

- Strange estas, kiel ni forgesas la duan parton de tiu frazo, diris la urbestro: « Ni ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo » diris Michel Rocard, « sed el tiu mizero ni povas preni nian parton! ». Al tio ni estas instigataj. Ne pli, ne malpli, kun klarvideco, flanke de tiuj por kiuj la azilrajto havas signifon, por tiuj animataj de la solidarecaj valoroj. Multnombraj ili subskribis tiun alvokon: